7-a JARO, N-o 314



LEIPZIG, 9. / 10. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO: E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. — ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

KARLO MARKS PRI HINDIO

Mi intencas en ĉi tiu artikolo konkludi[1] miajn observojn pri Hindio.

Kiel estis starigata la angla superregado en Hindio? — La supera povo de l' Granda Mogolo[2] estis rompita de la vicreĝoj mogolaj, la povo de l' vicreĝoj estis rompita de la maratoj[3], la povo de l' maratoj estis rompita de la afganoj, k, dum ĉiuj batalis kontraŭ ĉiujn, la britoj invadis k povis, sen fortostreĉoj, ilin ĉiujn subigi. Lando dividita, ne nur inter mahometanoj k hinduanoj, sed inter triboj k triboj, inter kastoj k kastoj, socio, kies trabaro estis formita el speco de ekvilibro rezultanta de la ĝenerala antipatio, kiun havis ĉiuj membroj unuj kontraŭ la aliaj, de la malkapablo, en kiu ili estis toleri sin reciproke, ĉu tia socio, tia lando ne estis rabaĵo antaŭdestinita? Ni povus ĝin aserti, eĉ se ni nenion konus pri la pasinta historio de Hindustano, pro la sola fakto, ke en nuntempo Hindio estas tenata submetita al Anglio per armeo el hinduoj, pagata per hindua mono. Hindio, en tiu ĉi periodo, ne povis eviti la destinon esti konkerata, k ĝia tuta historio pasinta, se oni povas nomi tiun ĉi pasinton historio, estas nur sinsekvaj konkeroj, kiujn ĝi trasuferis. La hinda socio havas nenian historion, almenaŭ nenian historion konatan. Kion ni nomas ĝia historio, tio estas nur la historio de l' sinsekvaj invadintoj, kiuj starigis siajn imperiojn sur la inertaj fundamentoj de tiu ĉi malagema k senmova socio. La demando, konsekvence, ne estas scii, ĉu la angloj havis la rajton aŭ ne, konkeri Hindion, sed tiu — scii, ĉu ni preferas la Hindion konkeritan de l' turko, perso aŭ de l' ruso al la Hindio konkerita de l' anglo.

Anglio devas en Hindio plenumi duoblan mision: unu detruan, alian rekonstruan; ĝi devas nuligi la malnovan azian socion k meti la materiajn fundamentojn por la okcidenta socio en Azio.

Araboj, turkoj, tataroj, mongoloj, kiuj sinsekve trapasis Hindion, "hinduiĝis" rapide, ĉar la konkerantoj estis barbaroj, laŭ eterna leĝo de l' historio, konkeritaj mem de la supera civilizo de iliaj subigitoj. La britoj estis la unuaj konkerantoj, kiuj havis civilizon superan al tiu de l' konkeritoj; konsekvence, ili estis neatingeblaj en sia civilizo. Ili do detruis ĝin frakasante la indiĝenajn komunumojn, detruante la indiĝenan industrion, egaligante ĉion, kio estis granda k alta en la indiĝena socio. La historio de ilia regado super Hindio raportas apenaŭ ion alian ol tiun ĉi detruadon. La laboro de l' rekreado manifestiĝas apenaŭ ete tra amaso da ruinoj. Tamen, ĝi estas komencita.

La politika unuo, unuo pli solida k etendiĝanta pli vasten ol iam estis farita sub la Grandaj Mogoloj, estis, por Hindio, la unua kondiĉo por ĝia rekreiĝo. Tiu ĉi unuo, trudita de l' brita glavo, estos nun fortigita k ĉiamigita per la elektra telegrafo. La indiĝena armeo, organizita k ekzercita de la brita serĝento-instruanto, fariĝis la "sine qua non" (*nepra kondiĉo*) por la emancipiĝo de Hindio per si mem, por Hindio ĉesanta esti la rabaĵo de l' unua fremda invadanto. La preslibero, unuafoje enkondukita en azia socio, k donita ĉefe pro komuna deveno de hinduoj k eŭropanoj, estas nova k potenca rekonstrua faktoro. La sistemoj de Zeznindar k Rajotvar (*Ryotwar*) mem[1], kiom ajn abomenaj ili estas, entenas du formojn distingajn de privata posedo de l' grundo, tiu ĉi granda deziro de l' azia socio. La hindaj indiĝenoj, kvankam edukitaj malgrandnombre k kontraŭvole en Kalkuto, sub la brita kontrolo, naskis novan klason, dotitan per la necesaj konoj por regi k influitan plene de la eŭropa scienco. La vaporo komunikigis Hindion per rapidaj k regulaj rilatoj kun Eŭropo; ĝi kunligis ĝiajn ĉefajn havenojn kun tiuj de l' tuta Hinda oceano, ĝi elkondukis ĝin el ĝia izolita situacio, kiu estis la unua kondiĉo de ĝia malaktiveco. La tago ne estas tre malproksima, kiam per kombino de fervojoj k ŝipoj, la distanco inter Anglio k Hindio, laŭ tempo mezurita, ne estos pli ol 8 tagoj, k tiam ĉi tiu lando, iam legendeca, troviĝos plue aligita al la okcidenta mondo.

La regantaj klasoj de Britio ne havis intereson ĝis nun pri la progreso de Hindio, se ne hazarde, kie transira k escepta. La aristokrataro deziris nur konkeri Hindion, la financistoj ĝin elrabi, k la industrio tien vendi malpli kare ol tion povus fari la hindoj mem. Sed nun la aferoj turniĝis. La industriistoj malkovris, ke la transformo de Hindio en produktantan landon fariĝis viv-esenca por ili, k ke estas necese tiucele doni al ĝi, antaŭ ĉio, rimedojn por traakvigo k rimedojn por internaj komunikiĝoj. Ili havas do nun la intencon tie starigi fervojaron. Kaj ili ĝin faros. La rezultoj de tio estos netakseblaj.

Estas bone konate, ke la produkta povo de Hindio estas paralizita pro la kompleta manko de transport- k interŝanĝ-rimedoj por siaj diversaj pro-

---

[1] Du artikoloj antaŭiris. Marks verkis ilin antaŭ 77 jaroj por la usona ĵurnalo *Novjorka Tribuno*, okaze de la konstruado de l' unuaj fervojoj en Hindio. (Ĉi tiu noto k sekvantaj estas de l' tradukinto.)

[2] La grandaj Mogoloj, mahometanaj suverenoj en Hindio.

[3] Hindua popolo, loĝinta en la regiono de l' nuna Bombe (*Bombay*).

[1] Sistemoj de bienposedaĵo faciligantaj la impostdeprenon de l' brita administracio.

duktoj. Nenie pli ol en Hindio, ni renkontas tian senhavecon meze de tiom da riĉaĵoj, pro manko de interŝanĝrimedoj. Estas pruvite antaŭ Komitato de l' Parlamento, en 1848, ke "kiam la greno estis vendita de 6 ĝis 8 ŝilingoj po buŝelo en Kandeŝ, ĝi estis vendita de 64 ĝis 70 ŝil. en Puna, kie la homoj mortis pro malsato en la stratoj ne povante ricevi grajnojn de Kandeŝ, ĉar la argilecaj vojoj estis neuzeblaj".

La fervojoj povos facile esti starigataj por tiel kontentigi la terkulturajn bezonojn, per la konstruado de cisternoj, tie kie la tereno por ĝi taŭgas, k la akvotransporto el de tiuj ĉi cisternoj laŭlonge de la diversaj linioj.

Tiel la traakvigo, la "sine qua non" de l' kulturo en Oriento, povus esti larĝe etendata, k la lokaj periodaj malsatoj tiel oftaj, kiuj devenas de akvomanko, estus malebligataj. La gravo, laŭ ĝenerala vidpunkto, de l' fervojoj, pro la faciligoj, kiujn ili alportos al la traakvigo, fariĝas evidenta, se ni memoras, ke la traakvigitaj teraĵoj, eĉ en la distriktoj lokitaj apud la Gat[1], pagas trioble pli da impostoj, liveras laboron al dek- aŭ dekduoble pli da personoj k havigas dekdu- aŭ dekkvinoble pli da profito ol la sama grundo sen akvigo.

[1] Montoj, kiuj randiras la okcidentan k orientan limojn de l' hinda duoninsulo.

La fervojoj donos la rimedon malpliigi la nombron k la koston de l' militaj institucioj. La kolonelo Ŭorn (*Warren*), majoro de l' fortikaĵo Sankta Vilhelmo (*Saint-William*), esprimis sin tiel, tiuteme, antaŭ Komitato limigita de l' Parlamento:

"La eblo ricevi informojn el malproksimaj regionoj de l' lando, en tiom da horoj, kiom tio postulas nuntempe da tagoj, eĉ da semajnoj, k sendi instrukciojn al la trupoj k magazenoj en la plej mallonga tempo, estas konsideroj, kiuj ne povus esti taksataj tro alte. La trupoj povus esti enkazernigataj ĉe punktoj multe pli malproksimaj unuj de la aliaj, k multe pli sanaj ol nuntempe, kio malpliigus la perdojn pro malsano. La varoj povus esti dispartigataj en nombron pli malgrandan da deponejoj, kio evitigus la perdojn pro difektiĝo k la detruojn kaŭze de l' klimato. La nombro da trupoj povus esti malpliigata en proporcio rekta al ilia efikeco."

(Finota)

ĝusta, povas doni malĝustan bildon, pro tio ke ne estas menciita la granda nombro de "nenies infanoj". Tiuj senlaboruloj, kiuj ne estas enkalkulataj en oficialaj statistikoj ricevas nek ŝtatan nek metiunuiĝan subvenciojn. Inter ili troviĝas tiuj malfeliĉuloj, kiuj dum tro da tempo ne sukcesis trovi laboron k laboristoj el metioj, kiuj laŭleĝe ne estas asekureblaj (ekz. farm- k bienlaboristoj, butikistoj k kolportistoj).

Estas videble, ke la kondiĉoj eĉ por plej alte pagataj metiistoj ne estas tre bonaj k por la aliaj estas mizeregaj. Tio ne estas stranga, sed strange estas, ke spite la mizero preskaŭ forestas ribelemo ĉe nialandaj laboristoj.

EL SKOTLANDO

Turbo, Edinburgo.

Vizitante Britio, speciale tiun nordan parton de la insulo — Skotlandon, K-doj eksterlandaj ofte trafas en embarason, kiam oni petas, ke ili donu siajn opiniojn pri la ĉi tiea politika situacio. "Politika marĉo ĝi ja estas", neniu el ili tion pridubas, sed malfacile estas por ili klarigi al si aŭ alia la kaŭzojn. Mi ne intencas skribi ĉi tie pri ideologiaj katenoj ktp., sed mi provos per mallonga priskribo de l' viv- k laborkondiĉoj en Edinburgo klarigi unu flankon de la afero k lasas al la legantoj mem fari siajn proprajn konkludojn.

Jenas la salajroj k laborhoroj en kelkaj el la plej grandaj metioj:

	Ŝil. (semajne)	Laborsemajno
Presistoj	77½	48 horoj
Pentristoj	73	44 "
Bakistoj	72	45 "
Lignaĵistoj	69	44 "
Mekanikistoj	58	47 "
Kaŭĉuk-laboristoj	35	48 "

De la supraj salajroj oni deprenas 7 pencojn (4/12 ŝil.) por ŝtata asekuro kontraŭ senlaboreco. Dum senlaboreco la laboristo en la asekurataj metioj ricevas semajne:

por si mem 17 ŝil.
" edzino 9 " (se ŝi ne laborakiras)
" ĉiu infano 2 " (se ĝi ne laborakiras) (malpli ol 16-jara)

Multaj laboristoj estas anoj de metiunuiĝo, al kiu ili pagas proksimume 2 ŝil. semajne (la sumo multe varias) k ricevas subvencion dum senlaboreco. Tiu subvencio varias laŭ la kotizo en la diversaj unuiĝoj k en kelkaj okazoj estas gradigita laŭ periodo de aneco. Ĝi diferencas de 7 ŝil. en la mekanikista ĝis 20 ŝil. en la presista unuiĝoj. Ekz., senlabora pentristo kun edzino k 2 infanoj dum 3 monatoj de senlaboreco povas ricevi ĉiusemajne

ŝtatsubvencion de . . . . . . 30 ŝil.
meti-unuiĝan subvencion de 10 ŝil.
sume 40 ŝil.

Evidentiĝas el ĉio ĉi, ke multaj senlaboruloj enspezas pli ol la "bonŝanculoj", kiuj laboregas dum 48 horoj semajne en la kaŭĉukfabriko, la plej granda fabriko en Edinburgo.

Nekompleta estas la bildo sen preztabelo pri la vivnecesaĵoj. Kvankam mi nur citas kelkajn el la ĉefaj aĵoj, la listo certe ebligos komparadon.

Paño	8 pencoj (8/12 ŝil.)	1 kilo (proks.)
Lakto	6 "	1 litro "
Ovoj	2 "	po peco "
Bovaĵo	1¼ ŝil.	½ kilo "
Terpomoj	2 pencoj	1 kilo "
Butero	2 ŝil.	½ kilo "
Lupago	8 ŝil. semajne	2 ĉambra domo
Karbo	1 ŝil.	50 kilog. (pr.)
Kompleto da vestoj	60 ŝil. (proks.)	
Paro da botoj	12—20 ŝil. (proks.)	

En la supra tabelo mi ne inkluzivas aĵojn, kiaj estas cigaredoj k biero, kvankam preskaŭ ĉiu laboristo fumas k la plimulto kredas, ke akvo ne estas trinkindaĵo.

La ĉi supra priskribo, kvankam

LA SVEDAJ ELEKTOJ

En la fino de septembro okazis la elektoj al la svedaj provincaj parlamentoj (svede *Landsting*) por la estonta kvarjara periodo. La elektoj indikas ankaŭ samtempe la elektitojn por la Senato, la unua ĉambro.

Montriĝis, ke la burĝaj partioj, kiuj depost j. 1928 fondis blokon kontraŭ la laborista partio k provis inaŭguri doganeman politikon, per la elekto ricevis sufiĉe fortan respondon, ĉar la registara partio — maldekstra burĝa partio — perdis 40 mandatojn. Tiu partio havis antaŭe nur tre malvastan fundon en la parlamento, sed post la elekto forestas ankoraŭ kvarono de ĝia tuta havo. Nur la kamparana k socialdemokrata partioj havis gravajn gajnojn.

La tabelo montras la rezulton de l' elektoj

Partio	Nombro en 1930	Mandatoj	Gajnoj aŭ perdoj de mandatoj
La dekstruloj	384 166	329	+ 3
Kamparana asocio	224 398	185	+ 19
Liberaluloj k popolliberaluloj	210 263	141	— 40
Socialdemokratoj	568 969	469	+ 31
Komunistoj	50 485	8	— 6[1]
Sume:	1 438 281	1 126	

(13 131, Stockholm).

[1] Tiujn mandatojn ricevis komunistoj ne apartenantaj al la III-a Internacio. La komunistoj, anoj de la III-a Internacio, ricevis neniun mandaton.



Post kelkaj tagoj aperos
kiel 11-a volumo de "Biblioteko de Sennaciulo" belega
POEMO DE L' PLUGISTO
originala esp. versaro de ĤRIMA.
56 pĝ. Form. 11×14. Prezo: **0,60** mk. g.
Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

SARDUJO

SAT-ano 15973

(Daŭrigo. Vidu n-ojn 305/6, 309)

Elmigrado k sistema polica rekrutado

Kvankam en Sardujo estas grandegaj subteraj riĉaĵoj, la itala kapitalistaro, pro malkonvenaj transportrimedoj, neniam kuraĝis investi kapitalojn por ekspluati la tieajn trezorojn. La terkulturo, pro manko de ŝtata helpo, pro foresto ĉe tieaj terkulturistoj de teknika kapablo k pro ĉiaj malebligoj, pri kiuj mi jam skribis, ne estas sufiĉe fruktodona. Rezultas do, ke Sardujo estas unu el la italaj regionoj, en kiu la mizerego ĉiam regas plej forte. Konsekvence la sardo estas tre migrema. En ĉiuj mondpartoj troviĝas sardoj. Tiu, kiu sukcesas elmigri, konsideras sin la plej feliĉa homo. Li estas adaptiĝema al ĉiuj klimatoj. Li senpene kutimiĝas al la sufoka varmega klimato de l' ekvatoro, samkiel al la malvarmega polusa klimato, k tuj, kiam li troviĝas en fremda medio, li tre facile adaptiĝas ankaŭ al ties specialaj kutimoj. Parto da ili post 4 aŭ 5 jaroj da foresto reveturas al sia vilaĝo por revidi siajn parencojn, sed malmultaj estas tiuj, kiuj ne denove reveturas. Aliaj, teruritaj de la mizerego trapasita dum ilia infaneco, neniam plu revenas. Tial la loĝantaro en Sardujo anstataŭ plimultiĝi, malplimultiĝas senĉese, malgraŭ la karakteriza emo de la sardoj al naskigo de multnombraj familioj.

La mizeregaj vivkondiĉoj, kiuj konstante turmentas la sardan malriĉularon, iel profitas al la itala burĝaro. Fakte Sardujo estas vera rezervujo, en kiu la burĝaro rekrutadas grandan elcenton el siaj kofrogardistoj. Ja, trudataj de senfina terure mizerega malbonvivado, la sarda junularo, kiu ne sukcesas elmigri, elektas la vojon fariĝi ĝendarmo, policisto aŭ malliberej-gardisto. Aliaj fariĝas profesiaj brutar-ŝtelistoj. La ceteraj, certe la plej multnombraj, rezignas je batalo, kontentiĝante pri sia sorto, k laboregas honeste tage k nokte por viveti. Jam du aŭ tri monatojn post la grenrikolta sezono la malriĉa kamparano iras al riĉetulo por peti de li grenprunton, ĉar aliel li kun sia familio malsatmortus. Kompreneble en tiaj cirkonstancoj la pruntedonanto kaptas la okazon por postuli 25% da interezo ĝis la venonta grenrikolto. Fine, kiam alvenas la de la malriĉulo sopirita sezono, li apenaŭ rikoltas sufiĉe por redoni la pruntitan porvivaĵon k interezon. Tre ofte li eĉ ne sukcesas repagi la ŝuldon. En tiaj kondiĉoj la pruntedoninto forprenas lian terpeceton aŭ dometon.

Tial en Sardujo, same kiel cetere ĉie, oni povas konstati ian malpliiĝon da bienposedantoj k samtempe ian eksterordinaran pliiĝon da nenionhavantoj. Tian procezon, kompreneble, akcelas la faŝista reĝimo, tiel ke hodiaŭ la insulo aspektas kiel koncentriga kampo da malfeliĉuloj kondamnitaj al malsatmorto.

Indiferento al itala lingvo k al patriotismo

Nur de post mallonga tempo la registaro enkondukis leĝon pri deviga instruo de l' itala lingvo. Kvankam preskaŭ la tuta sarda junularo nun scipovas pli malpli bone skribi k legi, ili neniam parolas itale, escepte kiam al ili ne estas eble komprenigi sin per la sarda dialekto. Se iu parolus itale, scipovante paroli sarde, oni mokus lin. La plej ŝatata legaĵo estas la sarda poezio. Preskaŭ ĉiuj estas poeziamantoj, kompreneble kondiĉe, ke ĝi estu sarde verkita. Multaj, eĉ maljunaj personoj, penas lerni legi, nur por povi kanti sardajn poeziaĵojn. Se iu sarda poeto kapablus verki laŭ sarda poezio, agrablastile, revolucian programon, la plimulto el la tiea loĝantaro ellernus parkere ĝin senpene. Ili konsideras sian dialekton kiel patrinan lingvon. Tiu ĉi dialekto estas miksaĵo el itala, franca, hispana k latina lingvoj. Ĝia elparolado estas preskaŭ identa je tiu de esperanto. Mi estas konvinkita, ke se la ekzisto de esperanto estus tie konata, dum daŭro de mallonga tempo nia lingvo disvastiĝus tra la tuta insulo. Tion mi intencas fari, laŭ mia kapablo, tuj kiam la atmosfero en Italio fariĝos ree spirebla por klaskonsciaj laboristoj.

Escepte ŝtatoficistoj, ĝendarmaro k ĉiuspeca policistaro, la sardoj ĝenerale malŝatas Italion. La ŝtatimpostoj precipe estas kaŭzo de tia malamo kontraŭ Italio. La plej nepardonebla malamiko de la sarda loĝantaro estas la ŝtatimpost-kolektisto. Ĉi tiu, konante la mizeregan situacion, en kiu konstante troviĝas la loĝantaro, aranĝas la rabadon ordonitan al li de la ŝtato tiel, ke tuj kiam la malriĉulo penege sukcesas ŝpari moneron, ĝi estas forprenata. Ekzemple se iu devas pagi 200 lirojn kiel ŝtatimposton jare, k li ne povas pagi la tutan monsumon dum iu periodo difinita de la ŝtatimpost-kolektisto, ĉi tiu konsentas al li prokraston, sed la ŝuldata monsumo plialtiĝas. Se oni konsideras, ke pro neekzisto de industrio, la eblo ŝpari monon por la sarda malriĉularo estas tre malfacile akirata, oni povas kompreni, ke eta sumo reprezentas por ili grandegan havon. Tial preskaŭ ilian tutan monŝparon forprenas la ŝtato. Konsekvence ili malamas tiagrade la impost-kolektiston, ke se iu lerta revoluciulo kuraĝus malkaŝe propagandadi kontraŭ ŝtatimpostoj, li senpene kondukus la loĝantaron, ne esceptante et- k mez-bienposedantojn, al ĝenerala ribelo.

La sardo estas sufiĉe inteligenta ĝenerale por kompreni sian klasdevon, sed ĝis nun al li mankis sincera klaskonscia kleriganto k gvidanto. Krome, la fera itala kalkanumo premeganta senĉese la insulon trudas al la loĝantaro resti en la mallumo, en la nescio. Sed malgraŭ ĉio ĉi, per kruela faŝista reĝimo, nun li ekspertas k ekmalfermas iom post iom la okulojn. (Daŭrigota.)

PRI NEGROJ K IMPERIALISMO

SAT-ano 1380

La fakto, ke en la imperialisma Usono la negroj estas malbone traktataj, dum en la internaciisma Sovetio ili estas konsiderataj kiel aliaj homoj, ne pruvas, ke la imperiismo kulpas en tio. Francio k Anglio ankaŭ estas imperialistaj ŝtatoj; tamen oni neniam legis, ke en Parizo aŭ Londono negroj estis linĉataj. En Parizo estas multaj negraj laboristoj k tie oni traktas ilin kiel la blankajn — t. e. same ekspluatas.

La artikolo de *Grodnano* en la n-o 313 de "S-ulo" instigis min fari tiujn rimarkigojn. Konstati faktojn k klarigi ilian kialon ne estas la sama afero. La problemo estas multe pli malsimpla ol ŝajne ĝin vidas nia Sovetia K-do.

Eble interesos lin ekscii, ke la linĉado al negroj en Usono estas eĉ iafoje uzata de imperialistaj gazetoj en Francio por agiti kontraŭ la usonan imperialismon. Kiam, ekzemple, ne prosperis kontentige, laŭ la franc-kapitalista vidpunkto, la intertraktoj kun Usono pri la ŝuldoj la franca gazetaro estis abunde provizata per materialo pri linĉado en Usono. En ordinara tempo, malpli.

Estas tre amuze — aŭ plorinde — konstati, ke en Eŭropo la agitadon kontraŭ la Usonan imperiismon plenumas plej reakciaj gazetoj k ankaŭ plej maldekstraj. La rezulto estas, ke tiele oni bone preparas la spiriton de la amaso por partopreni eventualan militon inter la du kontinentoj. Ĉu ne estus pli saĝe, se la laboristaj gazetoj ne partoprenus tian agitadon k rekomendus al la proletoj, ke ili konsentu morti nur en batalo por sia klasa liberiĝo k ne pro la profito de ia kreiĝanta eŭropa patriotismo?

Pri la enhavo de artikoloj aperantaj en "S-ulo" respondecas la aŭtoroj.

SENNACIISMO — INTERNACIISMO

Mi estas nur simpla laboristo, kiu en sia junaĝo ne ĝuis iun lernejan edukon. Sed de la jaro 1896 mi estas ano de la Laborista Socialdemokrata Partio en Aŭstrio. Nun mi estas 52-jara k batalis kun aliaj partianoj konstante kontraŭ la enlanda kiel la eksterlanda Kapitalo. Pro tio mi ankaŭ lernis iom pri internaciismo k internacia solidaro.

Karlo Marks skribis en siaj verkoj pri la organizado de l' proletaro en la diversaj landoj. Li konsilis antaŭe organiziĝi laŭ nacilingvo en nacia tuto, poste internacie organiziĝi helpe de perantoj. Tiel ni unue nacie, poste internacie (en la Dua Internacio) organiziĝis. K. Marks skribis ankaŭ, ke ne ekzistas aliaj baroj inter la proletoj ol la nacilingvaj, sed kiel solvon pri la problemo li rekomendis nur internacian organiziĝon pere de perantoj, por tiele sukcese batali kontraŭ la nacia k samtempe internacia Kapitalo. Tiutempe ni opiniis esti fortaj k povi kontraŭstari ĉian atakon de l' reakciularo, malhelpi eĉ militon per internacie organizita striko. Tiusence oni skribis en laboristaj gazetoj, parolis la gvidantoj. Mi ne bezonas eldiri, kio okazis en 1914. Ni nek nacie, nek internacie protestis kontraŭ la milito . . . Tial mi diras: Internaciismo sen lingva kompreniĝo de l' mondproletaro estas nur granda trompo, konscie aŭ senkonscie farata de la gvidantoj.

Mi ekaŭdis pri sennaciismo, lerninte (en j. 1923) esperanton k komencinte legi "Sennaciecan Revuon" (nunan "S-ulo"n). Per klarigoj de K-do Lanti mi eklernis diferencigi inter Internaciismo k Sennaciismo. Sen la interkomprena lingvo, sen esperanto, tiu diferencigo nenion signifus, estus nura vort-ludo, k la praktiko restus la sama. Sub internaciismo kaŝiĝas ofte akra ŝovinismo. Sed K-do Lanti montris, ke per la rekta interkompreniĝo (per esperanto) ĉiu proleto povas fariĝi sennaciisto. De kiam mi estas SAT-ano, mi sentas min ligita kun la tutmonda proletaro k vera homo; ne plu ĉeĥo, kiu emas batali por la rajtoj de l' ĉeĥa nacio.

Kiam K-do Lanti parolis pri la sinteno de l' laboristaj gvidantoj rilate al nia movado, li havis la plenan aprobon entuziasman de mia koro. Mi mem faris tiajn spertojn, ke la lab. gvidantoj ne lojale konsideras nian esp. lab. movadon, kiel estus necese k dece. Multaj nunaj internaciistoj ne konsentos al la sennaciismo, ĉar estas ia flato en tio titoli sin reciproke: ni germanaj, ni ĉeĥaj, ni francaj socialdemokratoj. Kiel sennaciistoj ni forlasas tiun frazaron, kiu kaŝiĝas kiel abomena naciismo malantaŭ la internaciismo. Al la sennaciisma tendenco aliĝas nur tiuj, kiuj malkaŝe volas batali, sen rezervoj, por la liberigo de l' *tutmonda* proletaro el la jugo de l' mondskale reganta kapitalismo.

Tial mi ĝojas, ke nia gvidanto posedas tiun belan "rajd-ĉevalon"[1], k ke li sur ĝi bone rajdas k ofte surrajdas multajn ŝajnajn revoluciulojn. Kaj mi diru mian miron, ke K-do 348[1], anstataŭ gratuli K-don Lanti pro lia konsekvenca sinteno, provas moki lin.

Knourek (2474)

[1] Komparu n-on 305/6, pĝ. 501.

Ĉu vi jam donis vian konsenton pagi la abonmonon por via sovetia esp. K-do, kiu ankaŭ estonte dezirus legi "S-ulon"?

Ni ne perdos la kontakton kun la K-doj en Sovetio — ni starigos ĝin pli firme per via solidara ago!

ludadon, kun gvidado kiel en respubliko.

11 082 (Odense).

Hipokrita konduto de l' burĝaro en Kubo

Unuflanke: okazis manifestacioj de fanatikuloj k solenaj mesoj por la plibonigo de l' stato de religiuloj en Sovetio. Interalie la gazeto de l' Kuba k hispana grandburĝaro ("Diario de la Marina" = Gazeto de l' Navigado) skribis kontraŭ la nuna edukado sovetia, kiu detruas la religion, dion, la bazojn de l' nuna sociordo. Tiaj k similaj artikoloj montris al ni, ke la batalo de l' sovetiaj ateistoj estas organa parto de l' klasbatalo.

Aliflanke: la pastroj k monaĥoj forluigis preĝejon kun loko por pli ol 1000 personoj (kiu apartenas al malnovega monaĥinejo en Habano) por *kino*. Iutage la fanatikaj gereligiuloj trovis tie multkolorajn afiŝojn kun Tom Miks (*T. Mix*) k Klara Baŭ (*Bow*)[1] ktp. k kason, kie oni vendis biletojn por dek cendoj. La samaj personoj, kiuj protestis k malbenis kontraŭ la agoj de l' sovetiaj ateistoj, faris praktike la samon en Kubo — k ĉu iu burĝa gazeto en la mondo protestis? . . . Sed tio estas ebla ĉi tie, ĉar kino k preĝejo same erarigas, je la servo de l' burĝaro, la proletojn . . .

15 135 (Kubo).

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Kondiĉoj de danaj aktoroj

El Kopenhagaj aktoroj pli ol la duono perlaboras malpli ol 2000 kr. dan. jare, sed la grandaj salajroj plialtigas la proporcian (mezan? — Red.) salajron de la profesio ĝis 3000 kr. jare (1 kr = ĉ. 0,27 dol.). Kompreneble tiuj mizeraj salajroj kreas apartan aktorproletaron, kiu kreskas konstante. Dum kelkaj jaroj regis ia paca stato inter la aktoroj k la direkcio. Oni eĉ diris, ke en tiu malfacila tempo direktoroj k aktoroj havas komunajn interesojn. Antaŭ kelka tempo venis la unua militdeklaro: Iu direktoro deklaris, ke ne plu eblas dungi aktoron por 10 monatoj k nur eblas uzi lin dum 5. Nun la prezidanto de l' aktorunuiĝo respondis, ke la aktoroj devas aliel rilati al la direktoroj; ili ne devas toleri la daŭrajn provojn je "proletigo". Laŭ li la direktoroj estas superfluaj, plejofte nur mezbonaj aktoroj, ne uzeblaj sur la scenejo, aŭ tute simplaj negocistoj, kiuj havas neniun alian celon ol ekspluati aktorojn k publikon, k ke ili montriĝis fakte kiel plej danĝeraj malamikoj de l' aktoroj. S-o Rosov (*Rossow*), la aktor-unuiĝa gvidanto, admonas, ke la aktoroj prefere ludu en la teatroj memstare ol sub direktoro, "kiu ŝuldas al ni monon, kiam la teatro malbonfartas k malaltigas nian salajron, kiam ĝi prosperas". Li rekomendas la "divid"-

Raciigo k salajr-malaltigo en Japanio

Ĉe la Ĝeneral-Motora Kompanio (*General Motors*) en Osaka, kiu riskis grandan strikon tre atentitan tra la tuta lando, oni decidis alpreni, konsiderante la malviglan periodon, laŭ la Fordsistemo, kvintagsemajnan sistemon kun mardo plene libera. Ĝi estas efektivigita la 21-an de julio. Laŭ ĉi tiu nova sistemo, la labortagoj malmultiĝis ĝis 20 aŭ 21 tagoj monate k la enspezo de l' laborantoj sekve malaltiĝis je 20%.

Malsufiĉa nutriĝo de l'japana kamparano

Laŭ la plej lasta enketo farita de l' higiena fako de Enlanda Ministerio rilate la kamparojn de 22 gubernioj (Osaka, Tokio, Ĉiba, Nara, Tokuŝima k. a.), la nutrostato de l' kampara loĝantaro, kiu faras pli ol 54% de l' tuta loĝantaro en Japanio, prezentiĝas tiel ke la viando konsumata ĉiutage de unu persono egalas prezon de nur 1,6 seno (200 senoj egalas al unu dolaro). Per tia sumo oni preskaŭ ne povas aĉeti eĉ salon aŭ fiŝon. Koncerne la artnutraĵon por vilaĝaj infanoj, el 63 921 infanoj prenas lakton nur 3. La kunportata ĉefmanĝaĵo de 80% el la lernejinfanoj entenas peklitan prunon aŭ rafanon (la plej simpla, tial plej mizera manĝaĵo en Japanio).

Laŭ "Scienco Proleta" (n-o 9), Tokio.

[1] Famaj film-aktoroj.

MI VOLAS SCII...

Unu K-do proponis aranĝi en "S-ulo" novan rubrikon *Mi volas scii.* Per ĉi rubriko ĉiuj dezirantoj povus demandi pri diversaj aferoj ĝenerale interesaj por SAT-publiko k aliaj kompetentaj volontuloj el tuta mondo respondi la demandojn. Mi plene aprobas ĉi proponon. Jen estas mia respondo al liaj du demandoj.

1. Partio de bolŝevikoj (komunista partio) oficiale fondiĝis en la jaro 1903 el bolŝevika frakcio de tiama Rusia Social-demokrata laborista partio sub gvido de Lenin. Nunan nomon, *komunista partio,* ĝi portas laŭ propono de Lenin de la jaro 1918. Ĝis nun la partio havis 16 kongresojn, lasta el kiuj konstatis laŭ oficiala raporto de K. Kaganoviĉ, ke la partio havis en januaro 1928 1 302 854 anojn k en aprilo 1930 1 852 090 anojn (1 210 527 efektivaj membroj, 641 563 kandidatoj). El ili laboristoj 68,2%, ceteraj — vilaĝanoj, oficistoj k aliaj (sen ruĝa armeo, kiu havas multajn komunistojn-vilaĝanojn).

2. Pri ento (tuto de la ecoj, kiuj faras esencon de estaĵo) de trockismo. Trocki estis lefa (maldekstra) ano de sovetia kompartio, unu el plej talentaj k influaj agantoj de rusa revolucio. Pro principaj malkonsentoj post revolucio li estis eksigita el la partio, ekzilita en mezazian urbeton Frunze k poste elsendita eksterlanden, ĉar li ne ĉesis batali kontraŭ tendencoj de sovetia registaro. Li asertas, ke 1. socialismo en sola lando ne povas esti finkonstruita; 2. vilaĝanoj kiel privatposedantoj ne povas akceli socialismon k 3. komunista partio devas prezenti el si kunligon de frakcioj ĉiutendencaj. Li opiniis, ke oni devas pliintensigi industrion en Sovetio (pli ol faris tiama registaro). Por efektivigi la industriigon li planis premi sur la vilaĝanon, aranĝi devigan pruntepronon (en la jaro 1925). Li akuzis la sovetian kompartion pri dekstrumiĝo, pri vole-nevola nacialismo[1].

La partio trovis, ke tia superindustriigo tiam ne estis ebla pro manko da rimedoj k konkludis, ke trockismo malvarmigas revolucian fervoron de sovetiaj laboristoj, ĉar ĝi kredigas, ke socialismo en sola Sovetio ne eblas. La partio konkludis, ke Trocki ne komprenas la rolon de l' vilaĝanaro en konstruado de socialismo, ke li sendisciplinigas partianojn, ĉar li akcelas frakciiĝon k finfine burĝan demokration...

Miavice mi demandas sciantojn: kiel nun Trocki rilatas al esperanto? Estinte en Sovetio li, kiel la plejmulto el poliglotaj gvidantoj, ironie rilatis al nia movado, sed timis klare esprimi ĉi rilaton, ĉar li subsentis, ke tia rilato al unu el la plej progresemaj movadoj finfine devas vidigi nekapablon de nunaj laboristgvidantoj kompreni urĝajn bezonojn de l' emancipiĝo k de lingva progreso ĝenerale. Niaj gvidantoj kvazaŭ tute forgesis la principon konatan eĉ al prabiblianoj: "ne sole per panprovizoj vivos la homo" (ruse nun kondiĉe: *ne ĥlebozagotovkami jedinymi ĵiv budet ĉelovek*[1]). Kie nun loĝas Trocki k kion li faras, kian profesion li laboras?

M. Krjukov.

[1] Pro postulo de la aŭtoro ni ne ŝanĝas la ortografion de ĉi tiu vorto; sed komprenéble ĝio ne signifas, ke ni ĝin aprobas. — *Red.*

[1] T. e. ne per solaj regnaj panprovizadoj vivos la homo.

Por baldaŭ povi ree aperigi

12-paĝan "S-ulo"n

necesas reatingi la financan staton, kiun ni havis, antaŭ ol ekhaltis la montranssendoj el Sovetio. Tio estas ebla nur per intensa k sistema varbado tra la mondo por nia gazeto.

Ekagu, Gek-doj!

LIBERTEMPO!

Mi staris ĉe la stacidomo adiaŭinte du Aŭgsburgajn SAT-anojn, kiuj forveturis al Londono okaze de la 10-a Kongreso. Mi certe envius ilin, se mi ne scius, ke post 14 tagoj, SAT-anino 11 576, promesis ree viziti min. Ĉu ekzistas por SAT-ano pli granda ĝojo ol renkontiĝi kun siaj eksterlandaj Gek-doj? Je la 9-a de aŭgusto alvenis la K-dino en Aŭgsburgon. Mi ne povas priskribi la ĝojon, kiam mi povis post disiĝo unujara (nura interligo estis la leteroj) revidi, manpremi k bonvenigi ŝin. Ni Aŭgsburganoj estis feliĉaj k fieraj pro ŝia vizito kiun ŝi ebligis malgraŭ la multekosta vojaĝo dank' al tutjara ŝparado. Kaj ni estis dankemaj al ŝi, ĉar ŝi preferis veni ĉi tien ol pasigi pli malkare sian libertempon en loko pli proksima je ŝia loĝejo.

Spite pluvo ni motorbiciklis al Munĥeno en unu tago por rigardi kelkajn el la tieaj vidindaĵoj. Pli da ĝuo prezentis vizito al la bavaria montara regiono, al Fisen *(Füssen)*, apud rivero Leĥ, kie ni restis tri tagojn. Ni estis sufiĉe armitaj por montgrimpado, k ankaŭ nia amikino ne eĉ unu fojon plendis pro la laciga irado. Priskribi la pejzaĝon oni efektive ne kapablas; oni vidas lagon post lago inter montoj; sur alto rokara leviĝas belega kastelo Nojŝvanŝtajn *(Neuschwanstein)*, konstruita el pura marmoro, kun multaj turoj k turetoj. Arbaroj, montetoj, montegoj kun eterna neĝo ĉirkaŭas ĝin, k en la valo kuŝas idilia lago, en kies akvo reflektiĝas la pintoj de neĝokovritaj montoj. Tie ni eksentis, kiaj sklavoj ni estas: nur riĉuloj renkontiĝas ĉi loke, por resanigi siajn korpojn de troa ĝuo de l' vivo en urboj kun virinoj ktp. Ni ne povis longe resti en tiuj regionoj pro nia malplena proleta monujo, k ni adiaŭis kun deziro sur lipoj, ke iam tiuj ĉi belaĵoj apartenu al malsanaj gelaboristoj en socialisma ŝtato. La kastelon ni ne povis rigardi interne pro la alta monsumo postulita (3 mk. g.). En apuda kastelo *(Hohenŝvangaŭ)* ĵus libertempis la edzino de l' germana eksimperiestro Vilhelmo la II, laŭŝajne por ripozi de la laciga vivo, kiun ŝi pasigas en Holando kun sia edzo.

Ankaŭ ni malsupreniris al Tirolio. Neniu doganisto ĝenis nian limtransiron, nur en la vagonaro oni kontrolis.

La 22. aŭgusto estis adiaŭa tago por nia K-dino, kiun ni forlasis ĉe la stacidomo kun bondeziroj k espero je revido, se eble dum la venonta kongreso. Vivu nia amikeco, vivu nia lingvo, vivu la unuigita SAT-anaro! Ni daŭrigu nian batalon estonte kun duoblaj fortoj.

SAT-ano 11 128.

E K A B O N U

Se vi ankoraŭ ne faris!

al

LA NOVA EPOKO

la monata literatura revuo de SAT, unika lit. gazeto en Esperantio, kiu aperigos en sia nova eldonjaro multajn interesajn originalojn k tradukojn literaturajn k sciencajn.

LA GRANDA DISVASTIĜO DE

PETRO

la kursa lernolibro por laboristoj laŭ la rekta, parola metodo **pruvas nedisputeble ĝian taŭgecon por la instruado.** En la formo de interesa, alloga rakonto kun klasbatala tendenco la komencanto lernas kun plezuro k laŭ modernaj principoj nian lingvon.

64 pĝ.

Prezo: 0,70 mk. g.

Administracio de SAT, Leipzig O 27, Colmstr. 1.

SENNACIULA SCIENC-KULTURA PAĜO

N-o 29 Sub la Kontrolo de Scienc-Kultura (Akademia) Sekcio de SAT. Redakci-adreso: DIM. SNEĴKO, Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio).
Sekretario de Sekcio (redakcia adreso por terorlandoj): H. MURAVKIN, Fürtherstrasse 11 a III, Berlin W 50 (Germanio).

AKTIVIGU NIAN LABORON!

Somero pasis. Alvenas tagoj de nia insista laboro. Niaj sekcianoj devas bone memori, ke nia Sekcio, same kiel nia Asocio, estas *peresp-a* organizo de klasbatalaj proletoj. Ni do devas ĉiam zorgi pri pli aktiva praktika peresp-a agado. Ni devas konstati, ke nia laboro plejparte ne estas farata en SAT, k ĝiaj sekcioj ne tre zorgas pri ĝi. Ni rajtas plene diri, ke nia Asocio fariĝis iu sekto kun iu "propra ideologio", sed forgesis pri siaj praktikaj taskoj. Nia Sekcio ankaŭ havas tiurilate siajn mankojn. Memkritiko helpu al ni eviti "rifojn" k fariĝi seka "akademia" eksterviva sekcio. Ja okazis fortigo de kultur-interrilatoj inter apartaj landoj kun partopreno de nia Sekcio, ankaŭ priservado de ĵurnaloj per kultur-sciencaj artikoloj, aranĝo de vesperoj dediĉitaj al prol. kulturo de apartaj landoj; kelkaj sekcianoj laboras ĉe kulturaj k sciencaj organizoj. Sed tio ne donas al ni la rajton diri, ke nia peresp-a laboro estas sufiĉa! Ni nur estas je komenco de nia laboro. La proksima jaro devas antaŭenpuŝi nian agadon, ĉe ISIS, en kulturaj prol. organizoj. Jen niaj taskoj. Ni servu per esp-o starigante fortan interligon inter div. kulturprol. organizoj. — La projekto pri aperigo de aparta scienc-kultura n-o de "LNE" ne estas utopio, sed realaĵo, ĉar preskaŭ ni jam havas sufiĉan materialon. Ni do kolektu por dua, tria n-oj ktp. — Necesas pliaktivigi kunlaboradon al nia Paĝo. Kvankam pri ĝi ni havas kelkajn bonajn recenzojn, ĝi ne estas ankoraŭ perfekta. — Resume: ni aktivigu nian laboron en la Sekcio, ni iru al prol. kult. organizoj, proponante nian servon, montrante, ke ni ne estas iu sekto, sed proletoj, kiuj per sia lingvo partoprenas en ega klasbatalo.

D. Sneĵko.

LA RUSAJ FILMOJ EN EKSTERLANDO

(Fino. Vd. n-ojn 299, 307)

La lasta filmo de "Meĵrabpom" (filmprodukta asocio en USSR), prezentata en eksterlando, nomiĝas "Ribelo en pundomo", verkita de la juna reĝisoro J. Rajsman[1]. La siberia vintro estiĝas antaŭ ni, la unutoneco de la glaciiĝintaj marĉoj k la vivo de l' malliberuloj en tiu dezerta regiono. Koncizaj tekstvortoj enkondukas la filmon: "Dum la cara epoko ekzistis duspecaj punoj: la pendigilo k Siberio". Ĵus marŝas taĉmento da kondamnitoj, inter armitaj gardistoj, al ekzilo.

En la pundomo estas ŝanĝata la direktoro k venas nova estro, la iama prokuroro Sarfski. Li pritraktas la arestitojn tute aliel ol lia antaŭulo, precipe suferas sub lia akra reĝimo la politikaj malliberuloj, kiujn la filmo nomas "intelektuloj". Ankaŭ al ili nun estas ordonata viziti la preĝejon; sed dum la krimuloj akomodiĝas al nealigeblaj faktoj k genufleksas, la intelektuloj restas starantaj. Originale kantas 4 rusoj dum la filmprezentado k tiel plifortigas la impreson de l' vidata. Kiam la pastro legas: "Venu al mi, kiuj vi estas penantaj k ŝarĝitaj!", subite punejano kuras al la altaro k sin malsuprenĵetas tie antaŭ la piedoj de l' surprizata popo. Granda skandalo! La popo konsternita, la oficiro incitita, la civila publiko scivola... Ĉio ja estas farso: la popo eldiris la vortojn senpense, la direktoro vizitis la preĝejon por brili en sia estra rolo antaŭ la civiluloj k tiuj venis ne pro la diservo, sed pro "societaj konsideroj".

En tiu momento unu el la intelektuloj elkrias: "Friponoj!". La oficiro paliĝas k returniras malantaŭ kandelingon. Tuj la gardistoj formas ŝirmvicon k forpuŝas la malliberulojn.

Alian fojon la arestitoj provas ribelon. Enkatenite ili tiras barelojn sur glitveturiloj supren laŭ la deklivo. Unu falas teren pro laco aŭ malsano. La aliaj ekhaltante alrigardas. Gardistoj ordonas: "Pluen laboru!" La gvidanto de l' intelektuloj paŝas antaŭen, sed gardisto baras la vojon k avertas lin per la okuloj, prenante fajfilon al la buŝo. Ribelo ekflamas, fajfoj sonas, la glitveturiloj ruliĝas malsupren en lageton. La pundomuloj organizas malsatstrikon, samtempe direktoro Sarfski festas sian naskiĝtagon. En la karcero la intelektuloj decidas elekti kamaradon oferotan por atentigi la gazetojn pri la cirkonstancoj en la malliberejo. Dum la festenaj gastoj brue amuziĝas, la malfeliĉuloj lotas, kiu el ili destiniĝos je morto. Oni miksas paperetojn en ĉapo, unu post la alia elektas, ĉiuj slipoj malplenaj. Restas ankoraŭ du: por la gvidanto k unu kamarado. La gvidanto eltiras papereton: ankaŭ malplena. Lia kunulo sidanta apud li ekĝojas, ke la gvidanto, amata de ĉiuj, indulgiĝis. Sed momenton poste li ektimas; li ja forgesis, ke nur plu unu papereto kuŝas en la ĉapo k li estas la lasta elektanto, do li mem devas preni ĝin, kiu enhavas la krucon signifanta la mortjuĝon. Nokte la gvidanto petas la kunulon, transdoni al li la taskon de sinmortigo. La diskuto allogas gardistojn, kiuj forvenigas la gvidanton en kelan solan ĉelon, ĉar estas malpermesite paroli dumnokte. La punejanoj denove ribelas; intertempe sendito alportas telegramon al la direktoro. Sensuspekte la ebria Sarfski laŭtlegas: "Ni salutas la malliberulojn. Post 3 tagoj ni venos tien. Revolucia komitato Irkutsk." Ĉiuj mienoj ekrigidiĝas, la festo disrompiĝas, la kaptitoj estas liberaj! Nur la gvidanto de l' intelektuloj en la kelo nenion scias, nenion aŭdas tra la dikaj muroj. Li jam preparas la venenon sur benko, kiam subite en lasta momento la kunuloj krevigas la pordon k lin ĉirkaŭbrakas. "La libero venkis."

*

Tiel la rusaj filmoj tuŝas gravegajn problemojn, historiajn okazaĵojn, revoluciajn temojn. Mondkonata rusa kapablo k honestaj intencoj kunhelpas je la servo de l' proleta movado, en malfalsa maniero estas prezentitaj sociaj rilatoj k la fruktoj de la Rusa Revolucio en 1917. Eĉ burĝaj gazetoj ne povis nei la eminentan artan enhavon de tiuj filmoj, kvankam ili kutime substrekas la "tro fortan tendencon". Kvazaŭ la burĝaj filmoj ne entenus tendencojn, se ili kaŝas ĉiujn sociajn demandojn k anstataŭigas ilin per sensencaĵoj, celante tiel deflankigi la laborantajn homojn de iliaj klasaj celoj.

Kompreneble la registaroj de faŝistaj k eĉ (laŭdire) "demokrataj" landoj malpermesis la prezentadon de rusaj filmoj, timante ilian influon je la laboristaro. En Aŭstrio la laboristoj estas politike sufiĉe fortaj por malhelpi filmcenzuron, krome ili mem posedas kinematografajn teatrojn en la t. n. laboristaj hejmoj, kie oni prezentas la rusajn filmojn, se la kapitalistaj kinoentreprenistoj ne emas fari tion. Bedaŭrinde la laboristoj en tiuj landoj, kie estus plej necese plenumi klerigan laboron, ne povas vidi tiujn filmojn, ĉar la potenculoj pli ĝuste taksas danĝerojn por sia klaso ol ofte laboristoj. Ĝenerale la laborista kinopubliko estas tre pacienca k tolerema, k tion misuzas la kapitalistaj filmproduktantoj. Ankaŭ tiurilate la rusaj filmoj meritas laŭdon, ĉar ili instigas k akcelas la kritikemon k hardas la revoluciemon. Post kelka tempo esperinde ne plu estos eble, prezenti al laborista publiko kapitalismajn fuŝaĵojn. Dankeme ni atendas, ke la kreintoj de l' rusaj artaĵoj daŭrigu la verkadon de siaj kuraĝaj, multsignifaj filmoj.

F. S., Vieno.

[1] Germ. prilaboro de l' poeto E. Toller, kiu mem estis malliberigita pro partopreno je la komunista ribelo en Bavario (1919).

TRA ESPERANTIO

INTER NI

— Mi estas socialisto, militrifuzanto, strikanto, kiam necese, konstanta batalanto por nia klaso. Antaŭ ol SAT ekzistis, mi komencis lerni esp-on; mi aliĝis al BEA (Brita Esp. Asocio) k al UEA. Dum 20 jaroj mi instruis senpaĝe k diligente nian lingvon. Ĉu tiaj personoj, kia mi estas, ne preparis la grundon por SAT? Certe. Tial mi bedaŭras, ke iafoje vi parolas iom neĝentile pri neŭtraluloj.

— Se mi ofendis malprave ian sinceran, honestan neŭtralulon, li trovu ĉi tie mian pardonpeton. Jam delonge mi skribis, ke estis tempo, kiam la intereso de la mondlingva movado postulis, ke burĝoj k proletoj, policistoj k anarkistoj, katolikoj k framasonoj laboru kune por pruvi al la cetera mondo, ke artefarita lingvo povas vivi.

Tiu tempo jam delonge forpasis. Esperanto donis sufiĉe da pruvoj pri vivkapablo, por ke la homoj, kiuj deziras akiri firman opinion pri la mondlingva demando, povu esplori, aŭdi k rigardi ĝian pulsantan vivon. Kun nia britia K-do mi volonte konfesos, ke oni devas esti dankema al la unuaj pioniroj de la esperanta movado. Mi eĉ opinias, ke homoj apartenantaj al la plej reakciaj medioj, se ili lernas k propagandas esperanton, iel faras revoluciigan laboron. Tio cetere estas aliforme dirita en "For la Neŭtralismon!"

Ĉiam mi sincere ĝojis ĉe la konstato, ke esp-o prosperas en iu ajn burĝa medio. Se UEA havus 50 000 membrojn, konsistantajn el komercistoj, turistoj, bankistoj k. s. reprezentantoj de la burĝa klaso, neniu pli ol mi ĝojus.

Pro simila konsidero mi sentas min kvazaŭ supren levita de entuziasmo, kiam iuj Linberg, Cepelin, Kost, Belont k. a. akiras novajn venkojn super la distanco. Sed mia ĝojo estus ankoraŭ pli granda, se la Laboristaro posedus k utiligus mem la mirindajn flugmaŝinojn. Same rilate al esp-o.

Sekve oni ne povas ne bedaŭri ke lia ministra moŝto Henderson, membro de la II-a Internacio, preferis patroni la neŭtralan kongreson en Oksford ol nian en Londono.

Sed ni ne estu tro severaj por tiu Laborpartiano. Ne estas ankoraŭ tre malproksima la tempo, kiam anoj de la III-a Internacio, eĉ K-doj el Sovetio, partoprenis neŭtralajn kongresojn . . .

Espereble nia Britia K-do ankaŭ metos kun respekto sian neŭtralemon en la ĉerkon, kie kuŝas mortintaj dioj.

E. L.

ALVOKO AL LA SAT-ANOJ

SAT-anoj el okcidenta Bohemio (Ĉeĥoslovakio) kunvenintaj en *Zbuch* la 21-an de septembro 1930, esprimas sian malkontenton pri la longaj disputoj en SAT. Estas kolerige, ke estas tiom malmulte da sinrego rilate al la komuna afero. Niaopinie, se estus ĉiuflanke sincera volo kunlabori, se ĉiu SAT-ano subpremus en si ĉiun emon trudi sian opinion al la aliaj, se estus ĉe ĉiu K-do iom da amo al la afero, SAT povus servi kiel modela organizo por la interbatiĝemaj laborist-organizoj.

SAT devas esti nek social-demokrata, nek komunista, nek anarkista ktp. Ĝi devas esti ideologie sendependa, kontraŭdogma, kleriga asocio kun tre alta lojalo al ĉiuj socialismaj tendencoj.

La antaŭtempe foririntaj anarkistoj revenu (. . . se ne ankoraŭ okazis tiel). La redakcio atente kontrolu la artikolojn por evitigi eventualajn polemikojn. Por sia partio politika ĉiu povas labori per la koncerna frakcio. Ĉiuj forĵetu personan vantemon k neprudentan obstinon, estu toleremaj reciproke.

For ĉian partian fanatikon. Ni volas pacon en SAT!

SAT-anoj 5194, 7320, 15 618, 9284, 15 207, 4102, 13 116, 14 382, 15 768, 5960, 15 206, 6082, 6734, 9285, 6737, 6733, 14 998.

Esperantista Traktoro

Por la Dua Traktoro estas kolektitaj en Usono, Kubo, Nikaragvo, kun la ĝenerala deziro, ke ĝi estu nomota "Esperantista Solidareco", en

Novjorko (N. Y. City) de SAT-rondo k neesp-istoj	$ 68,25
Cleveland (per Robboy k Needelman)	30.—
Detroit (per March Vlado)	20.—
Katonah (per M. Starr)	2.—
Allentow (Koether)	7.—
Binghamton (W. Sieler)	1.—
Denver (Kerr)	—.10
Ruperto (Holt)	1.—
Toledo (7302)	1.—
Nikaragvo (Kiss)	—.25
Kubo (Habana) (per 15 135)	5.50
Sume	$ 136.10

Transigis al SAT-administracio por konto CK de SEU.

K-do Bonesper (SAT-ano 29).

KURIOZAĴOJ

En Antverpeno mi akompanis fremdlandan amikon al la domo de profesiaj sindikatoj. Li iris supren, serĉante iun oficejon. Dume mi atendis malsupre en la koridoro. Eniris k forpasis preter mi sinjoro, sur kies brusto mi ekvidis malgrandan verdan stelon.

— Ho, samideano! mi ekalparolis lin. Li returnis sin. — Ĉu esperantisto?

— Jes, jam delonge. Jam antaŭ la milito mi lernis esperanton.

— Ĉu vi estas ano de iu Antverpena grupo? Ĉu de "Verda Stelo" (burĝa)?

— Ne, mi apartenas al neniu grupo. Mi laboras ĉi tie en sindikat-oficejo.

— Pro kio vi ne SAT-aniĝas?

— Ĉar en SAT estas multaj komunistoj . . . k mi ne volas . . . Mi tamen abonas "S-ulo"n.

Jen oficisto de laborist-organizo, kiu vivas pere de laboristoj k — hontas esti SAT-ano.

*

Alveninte Vankover-on (en Brita Kolumbio, Kanado) mi serĉis esperantistojn. Laŭ la Jarlibro ekzistas tie unu SAT-ano. Ĉe la loĝejo nomita kiel adreso oni diris, ke li laboras tre malproksime en arbaro. Kaj oni montris al mi alian laboristan esperantiston. Post interkonatiĝo mi demandis lin, kial li ne SAT-aniĝas? — Li respondis, ke li ne povas esti SAT-ano, ĉar SAT estas komunista organizo.

— Tute ne, mi rediris, k mi provis lin ĝuste informi pri SAT.

— Jes, jes, mi scias tre bone, li rimarkigis, — sed plejparte ĝia anaro konsistas el komunistoj. Estante anarkisto mi agus kontraŭ mia konvinko, pagante membrokotizon al SAT k tiel subtenante komunistan organizon.

Post plua diskuto li promesis aboni "S-ulo"n.

Maristo 13 065.

KOMUNIKO DE LA DIREKCIO

Ni publikigis en n-oj 299 k 310 notojn rilate al la neeblo nuntempe liveri al sovetianoj, kiuj antaŭmendis la Plenan Vortaron, tiun volumon. Ni petis ilin repostuli la pagitan monon inkluzive rentumo. Povus esti, ke nun kelkaj el tiuj antaŭmendintoj havas la bonŝancon akiri la Vortaron pere de bonvolema korespondanto aŭ amiko ekster Sovetio. En tiu okazo estu komprenite, ke ni liveros la volumon je la antaŭe konsentita favora prezo, se ni, laŭ preciza indiko de nomo k adreso de l' sovetiano, por kiu estas aĉetata la verko, konstatis, ke la koncernulo fakte antaŭmendis ĝin.

UNUECIGO DE L' PRONONCADO

Feliĉe jam mortadas la malnova k malvera fabelo, ke la esp-istoj el diversaj landoj ne povas interkompreniĝi pro malbona prononcado. Male, ĉiu esp-isto, eĉ nur malmulte interparolinte kun fremdlandano, povas konstati kun ĝojego, ke unu vere bone komprenas la alian. Eĉ oni rakontas ŝerce, ke Berlinano pro sia dialekto en Vieno devis komprenigi sin per esp-o.

Tamen unu bedaŭrindaĵon oni devas noti, nome malgrandajn diferencojn koncerne la prononcon de longaj k mallongaj silaboj. Ekzemple hungarlingvanoj preskaŭ ĉiam prononcas "libereco", la germanlingvanoj "libereco" (– estas longa, ˘ mallonga elparolo). Ŝajnas, do, ke la regulo pri meza longo ne estas atentata. Tiu diferenco povus malaperi, se jam en la kursoj la instruantoj en la tuta mondo unuece instruus la prononcadon, sendepende de naciaj specialecoj. Oni tial interkonsentu, ke antaŭ ĉiu mola litero, per kiu komenciĝas la lasta silabo, estu elparolata longe la vokalo de l' antaŭlasta silabo; antaŭ ĉiu malmola litero mallonge. Same mallonge antaŭ ĉiu duobla konsonanto, ekz. săblo, vinăgro ktp. Molaj literoj estu nomataj: la kvin vokaloj k krome: b, d, g, ĝ, h, j, ĵ, l, m, n, r, ŭ, v, z; do malmolaj: c, ĉ, f, ĥ, k, p, s, ŝ, t. Oni elparolu ekz.: verĕco, ĉăpo, sed elspēzo, parolādo. Germanoj ekz. nelogike diras: laŭdāta k laŭdōta, sed laŭdīta. (Unuece oni ĉiujn tri prononcu mallonge, ĉar la lasta silabo komenciĝas per t). Aŭ ili diras: "fiăgo, sed fāgo, k. a. Alilingvanoj certe ankaŭ havas tiajn nelogikaĵojn en prononco. Per la proponata unuecigo oni facile povus forigi tiujn mankojn.

Rud. Fischer, Wr. Neustadt (Aŭstrio).

TRA LA MOVADO ◆
KRONIKO

SVEDIO. Laborista esp. klubo de Stokholmo aranĝis la 21-an de sept. instrukurson por instruantoj de la vintraj kursoj. La kurso, kiun gvidis K-doj E. Eriksson k J. Johansson, tre bone sukcesis. La unua parolis pri la organiza problemo k substrekis la gravon de fortaj esp. organizoj k la dua faris lekcion pri div. instrumetodoj k pri la instruarto entute. La partoprenantoj estis tre kontentaj k esprimis la deziron, ke la klubo aranĝu plurajn tiajn kursojn. *(13 131.)*

RECENZEJO ◆

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

E. Lanti, La Langue Internationale (La Lingvo Internacia). Eld. Fédération Espérantiste Ouvrière, 177; rue de Bagnolet, *Paris XX*. Form. 11,5×18. 78 pĝ. Prezo: 3,50 fr.

La dua eldono de tiu ĉi rimarkinda franclingva propaganda broŝuro de K-do Lanti estas iom pli ampleksa ol la unua eldono, ĉar ĝi entenas kiel suplementon laŭeble kompletan liston de esp. asocioj k gazetaro. Tre koncize, klare k objektive estas konigita ĉio, kion laboristo devas scii pri la problemo de l' internacia lingvo: historio, kompara studo de esp-o k aliaj lingvoprojektoj, pruvoj pri la supereco de esp-o k ĝia *vivo*, ĝia praktika aplikado, ĝia literaturo ktp. Resume, tre taŭga verketo nepre necesa por ĉiuj propagandistoj. G. A.

Oficiala poŝtkarto de l' princlando Liĥtenŝtajno. Teksto en germ. k *esp-a* lingvoj. 6 kartoj kun malsamaj bildoj. La serio estas havebla kontraŭ antaŭpago de 2 sv. fk. per poŝtmandato al *Sammlerpostamt Triesenberg, Liechtenstein.* Neordaj mendoj ne estas plenumataj. Koresp. en esp-o. Laŭdezire oni surskribas konvenan tekston en esp-o. La karto estas destinita por turisma propagando per esp-o.

NIA POŜTO ◆

15 618. — Bonvolu tiun verkon rekte mendi ĉe SAT en Paris.

Al kelkaj. — Jes, en la kotizo 1931 por *aktivaj membroj* estas ankaŭ entenata la abono al "S-ulo". *Adm.*

15 135. — Ni preferas manuskr. pri viv- k laborkondiĉoj en la lando mem (orig.).

11 082. — Ne utilas fari la trad. (Strindb.), ĉar la verketo aperis jam antaŭ jaroj en malnova S. R. *Red.*

KORESPONDADO

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Ernesto Hausmann (esp. lernanto), *Ruppersdorf, 255, ĉe Reichenberg,* kĉl, L, PK, PI, PM. Resp. garant.

FRANCIO

K-do Jean Gauthier *à Condat sur Vézère Dordogne,* kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Certe resp.

K-do Maurice Pineau (16 797), 75 rue de la Convention, *Paris-15* (skribisto, esp. lernanto), kĉl, PK, PI, il. gaz.

JARABONO 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

GERMANIO

K-dino Hilda Doll, Fookenstr. 68, *Frankfurt a. M.-Griesheim,* kun eksterlandaj K-dinoj pri ĉ. temo.

— Grupo Ffm.-Griesheim koresp. kĉl, pri iu temo. Adr.: F. Doll, Fookenstr. 68, *Frankfurt a. M.-Griesheim.*

K-do Max Wiedemuth, *N.-Oderwitz, 137-c (Sa.),* kĉl, L, PI, PM.

Kuracistino dez. koresp. kun samprofesianoj. Adr.: Gertrud Grünberg, Salzdahlumer Strasse 8, *Wolfenbüttel* (Braunschweig).

— Fotoamatoro interŝ. PM k fotojn kĉl, mi sendos fotojn de la alpoj ktp. Resp. garantiata. Adr.: Max Dost, Burgstr. 79, *Chemnitz.*

K-do Johannes Köhler, Neugraben 5, *Bautzen (Sa.),* interŝ. afiŝojn, traduku esperantlingven.

K-do Stefan Kirchschlager, Oberstr. 14, *Schmiedeberg (Rsgb.),* kĉl, L, PK, prefere kun fraŭlinoj. Nepre resp.

— 3 K-doj (22—25 j.) vigle koresp. kĉl pri ĉ. temoj, L, PK. Resp. garant. Adr.: K-do H. Glöckner, Siemeringstr. 20/1 l., b. Schwarz, *Leipzig W 33.*

K-do Chr. Hagen, Wermelskircher Str. 43, *Köln-Deutz,* kĉl, pri ĉ. temoj.

K-do Walter Vogel (socialdemokr.), Moreaustr. 17, *Dresden 24,* kĉl, L, PI. Resp. garantiata.

K-do Paul Majer, Sonnenstr. 48, *Chemnitz/Sa.,* kĉl, L, PK, PI.

— Junkom. ĉelo koresp. k interŝ. afiŝojn, fotojn ktp., kĉl. Resp. garantiata. Adr.: O. Wyzolniersky Postplätzchen, 7, 1/10, *Mainz.*

K-do Erich Dietrich, Dippoldiswalder Str. 19, *Dohna/Sa.,* PI, kĉl. Nepre resp.

HUNGARIO

— K-doj sendu al ni materialon, bildojn, il. gaz. por hejmgazeto. Adr.: B. Szerémi, VI, Petnehazy u. 80, 1/5, *Budapest.*

ITALIO

K-do A. Facchi, post vana provo koresp. kun siaj sovetiaj koresp.-antoj devas ĉesi iun ajn interrilaton pro cenzuro, konfisko, aŭtoritata malpermeso k admono de aresto. Pardonu la ĝenon!

JAPANIO

K-do Fukui-Takeŝi, 717 Noeĉo 2, Higaŝinari-ku, *Osaka,* interŝ. kĉl, esp-istajn Prol-organojn, ĉiumonate.

NEDERLANDO

K-do J. A. Timmers (stukisto), Hasebrpeckstraat 51, *Den Haag,* serioze koresp. pri ĉ. temoj, kĉl, L, PK, PI.

ENHAVO

	paĝo
Karlo Marks pri Hindio	9—10
El Skotlando	10
La svedaj elektoj	10
Sardujo	11
Pri negroj k imperialismo	11
Sennaciismo — internaciismo	12
La klasbatalo tra la mondo	12
Mi volas scii	13
Libertempo	13
Sennaciula Scienc-Kultura Paĝo	14
Tra Esperantio	15—16
Korespondado	16

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)